


LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO
POR LA

JUNULARO KAJ
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:
West-Graafdiijk (N.H.)
Nederlando.
Ĝironumero 209354 Nederlando.

Jarabono:
Nederlando: 0.80 guldeno
Eksterlande: 11 fr.fr.; 0.70 dol;
2.1 sv. fr.

Por progresintoj

LA MALJUNA KAMPULINO.

El: „La mirakla vojaĝo de Nils Holgersson”, de Selma Lagerlöf. — (Nils Holgersson kruele traktis bestojn. Pro tio li estis transformita en koboldon kaj devis travagi Svedlandon ĝis kiam li bone kondutos).

Estis jam mallume kaj apenaŭ strieto da lumo restis sur la ĉielo, kiam tri lacaj vojaĝantoj, duone dormante alvenis ĉe bieno, kiu kuŝis soleca, malproksime de la najbaraj. Kaj ne nur soleca ĝi estis, sed ŝajnis, ke neniŭ loĝas en ĝi. Ne leviĝis fumo el la kamentubo, nenia lumo radiis el la fenestroj, neniŭ homo movis sin sur la korto. Vidante tiun bienon, unu el la tri, kiu promesis resti maldorma, ekpensis: „Okazu kio ajn, sed ni klopodu eniri tiun bienon. Ion pli bonan ni certe ne trovos.”

Iom poste ili staris sur la interna korto de la kampdomo. Haltante du el ili tuj ekdormis, sed la tria rapide ĉirkaŭ-rigardis por malkovri, kiel li povos trovi lokon subtegmentan. La bieno ne estis malgranda. Krom la loĝejo, la stalo kaj la budo ankoraŭ estis longaj alkonstruaĵoj kun draŝejoj, provizejoj kaj magazenoj por la ilaro.

Sed ĉio aspektis tre mizere, malriĉe, kaduke. La loĝejo havis muskokovritajn murojn, kiuj ŝajnis esti tuj falontaj. En la tegmentoj estis grandaj truoj kaj la pordoj pendis oblikve sur difektaj ŝarniroj. Estis evidente, ke jam longe neniŭ klopodis enfrapi najlon ie.

Dume la maldormanto elpensis, kiu konstruaĵo estas la bovinejo. Li skue vekis siajn vojaĝkunulojn kaj kondukis ilin al la

stalpordo. Feliĉe ĝi estis nur per hoko fermita, kiun li facile levis per bastoneto. Li ĝemspiris pro faciligo, ekpensante, ke baldaŭ ili estos sekuraj. Sed kiam la stalpordo laŭte knarante malfermiĝis, li aŭdis bovinon ekmuĝi.

„Ĉu vi fine venas, mastrino?” diris la bovino. „Mi jam pensis, ke mi hodiaŭvespere nenion ricevos por manĝi.”

Rimarkante, ke la stalo ne estas malplena, la vojaĝanto haltis timigite ĉe la pordo. Sed jam baldaŭ li ekvidis, ke estas nur bovino kaj tri aŭ kvar kokinoj en ĝi, kaj li ree trovis kuraĝon.

„Ni estas tri malriĉaj vojaĝantoj, kiuj tre deziras esti en loko, kie vulpo aŭ homoj ne povas kapti nin,” li diris. „Ni volonte scius, ĉu tie ĉi estas konvena loko por ni.”

„Nu, mi opinias, ke jes,” respondis la bovino. „La muroj estas malbonaj, sed vulpo ne povos trairi, kaj loĝas ĉi tie nur unu maljuna virino, kiu certe ne kapablas kapti iun. Sed kiuj vi estas fakte?” ŝi daŭrigis, sin turnante en la stalo por vidi la novvenintojn.

„Mi estas Nils Holgersson el Vester Vemnhog, kiu estas transformita en koboldon,” respondis la unua enveninto, „kaj kun mi estas malsovaĝa ansero, sur kiu mi rajdas, kaj griza ansero.”

„Tiaj strangaj gastoj estis neniam en mia domo,” diris la bovino, „vi estas tamen bonvenaj. Sed mi preferus, ke la mastrino estu veninta por doni mian vespermanĝon.”

La knabo tiam kondukis la anserojn en la stalon, kiu estis tre granda, kaj lokis ilin en malplena ejo, kie ili tuĵtuĵe ekdormis. Por si mem li faris kuŝejon el pajlo, kaj atendis, ke ankaŭ li baldaŭ dormos. Sed tio ne estis ebla, ĉar la kompatinda bovino, ankoraŭ ne ricevinta vespermanĝon, daŭre sin movis. Ŝi tiris la kolŝnuron, paŝis dekstren, maldekstren en sia stalo kaj plendis pri malsato. La knabo ne povis fermi la okulojn; en sia spirito li vidis ĉion, kio okazis al ili dum la lastaj tagoj.

La bovino estis daŭre bruanta. Subite ŝi alparolis la knabon.

„Mi pensis, ke unu el la envenintoj diris, ke li estas koboldo. Se estas vere, li do certe scias, kiel prizorgi bovinon.”

„Kio do estas al vi?” demandis la knabo.

„Ĉagrenas min multe,” diris la bovino. „Mi ne estas melkita kaj ne prizorgita. Mi ne ricevis manĝaĵon por la nokto, nek freŝan pajlon sub mi. La mastrino venis ĉi tien por helpi min kiel kutime, sed ŝi estis tiom malsana, ke ŝi tuj devis reiri kaj ŝi ne plu revenis.”

„Estas tre malĝojige, ke mi estas tiom malgranda kaj malforta,” diris la knabo. „Mi ne kredas, ke mi povos helpi al vi.”

„Vi ne kredigos min, ke vi estas malforta pro via malgrandeco,” diris la bovino. „Ĉiuj koboldoj, pri kiuj mi aŭdis, estis tiom fortaj, ke ili kapablis fortiri plenĉaron da fojno kaj mortigi bovinon per unu pugnobato.”

La knabo ne povis ne ridi. „Ili certe estis aliaj koboldoj ol mi,” li diris. „Sed mi malligos vian kolŝnuron kaj maltermos la pordon por ke vi povu iri eksteren kaj trinki el iu akvujo tie kaj tiam mi provos grimpi al la fojnejo kaj ĵetos fojnon en vian manĝujon.”

„Jes, tio certe iom helpos,” diris la bovino.

La knabo faris kiel dirite, kaj kiam la bovino staris antaŭ plenigita manĝujo, li pensis pri ekdormo. Sed apenaŭ li rampis al sia lito, kiam la bovino denove ekparolis: „Certe vi opinias min tre teda, se mi nun ree ion petas.”

„Ne, tiel ne estos, sed estu nur io, kion mi povos plenumi,” diris la knabo.

„Do mi volus peti vin iri al la ĉambro, por vidi kiel la mastrino fartas. Mi tre timas, ke ŝin trafis akcidento.”

„Ne, tion mi ne povas fari, mi ne kuraĝas montri min al homoj,” diris la knabo.

„Sed vi ja ne timu malsanan, maljunan virinon,” diris la bovino. „Vi ne bezonas eniri la ĉambron. Ekstaru antaŭ la pordo kaj rigardu tra fendo.”

„Jes, se vi nenion alian deziras, mi povos iri,” diris la knabo.

Li malfermis la stalpordon kaj suriris la korton. Estis terura nokto. La luno kaj la steloj ne estis videblaj, la vento hurlis kaj torentis la pluvo. Sed plej timigaj estis sep grandaj noktuoĵoj, sidantaj vice sur la tegmento de la loĝdomo. Ili plendis ege pri la veteraĉo kaj terure estis la ekpenso, ke finiĝos kun li, kiam unu el ili rimarkos lin.

Dufoje la vento faligis lin kaj unufoje ĝi ĵetis lin en akvaĵon tiel profundan, ke li preskaŭ dronis. Sed tamen li bone alvenis.

Li surgrimpis kelkajn ŝtupojn, rampis trans la sojlon kaj venis en koridoron. La ĉambropordo estis fermita, sed estis en ĝi truo por la kato. La knabo do facile povis vidi, kiel statas en la ĉambro. Apenaŭ li enrigardis, kiam li ektimigite retiris la kapon. Maljuna, grizhara virino kuŝis tie sur la planko. Ŝi ne movis sin, nek plendis, kaj la vizaĝo estis mirige blanka. Estis kvazaŭ nevidebla luno pale lumigis ĝin.

La knabo rememoris, ke ankaŭ la vizaĝo de lia mortinta avo tiel mirinde blankiĝis. Kaj li komprenis: la maljunulino sur la planko en la ĉambro evidente estas mortinta. Certe la morto ŝin trafis tiel subite, ke ŝi ne plu povis atingi la liton.

Li sentis grandan ektimon, pripensante, ke li estas sola kun mortinto. Senprokraste li desaltis la ŝtuparon kaj kuregis reen al la stalo. Kiam li rakontis al la bovino, kion li vidis en la ĉambro, ŝi ĉesis la manĝadon.

„Do, la mastrino mortis?” ŝi diris. „Nun baldaŭ ankaŭ kun mi finiĝos.”

„Certe iu prizorgos vin,” konsolis la knabo.

„Vi ne scias,” diris la bovino, „ke mi estas jam duoble tiom aĝa kiam bovino kutime estas, kiam ŝi estas kondukata al la buĉejo. Sed por mi ne plu valoras la vivo, nun kiam ŝi ne plu zorgos min.”

Dum kelka tempo ŝi silentis, sed la knabo bone vidis, ke ŝi ne dormas, kaj ne manĝas. Ne longe daŭris, kiam ŝi ree ekparolis.

„Ĉu ŝi kuŝas sur la planko?” ŝi demandis.

„Jes, tie ŝi kuŝas,” respondis la knabo.

„Ŝi kutimis veni en la stalon,” daŭrigis la bovino, „kaj paroli pri siaj zorgoj. Mi komprenis, kion ŝi diris, kvankam mi ne povis respondi. En la lastaj tagoj ŝi ofte parolis pri sia timo, ke neniu ĉeestos, kiam ŝi mortos. Ŝi timis, ke neniu al ŝi fermos la okulojn kaj krucigos la brakojn sur la bruston. Ĉu vi eble volas fari tion?”

La knabo hezitis. Li rememoris, ke, kiam lia avo mortis, lia patrino lin zorge kuŝigis. Li sciis, ke oni devas fari tion. Sed aliflanke li sentis, ke li en ĉi tiu tremiga nokto ne kuraĝos iri al la mortinto. Li ne diris ne, sed li faris eĉ ne unu paŝon al la pordo.

Dum momento la bovino silente staris, kvazaŭ atendente respondon. Sed kiam la knabo diris nenion, ŝi ne ripetis la peton. Dum kelka tempo ŝi silentis, kaj tiam ekparolis pri la virino.

Estis pri ŝi multo rakontinda. Unue pri ĉiuj infanoj, kiujn ŝi edukis. Ili venis ja ĉiun tagon en la stalon, kaj somere ili kondukis la brutojn al la marĉo kaj laŭ la kampoj; sekve la maljuna bovino konis ilin ĉiujn. Ili estis tre bravaj, gajaj kaj diligentaj. Bovino certe komprenas, ĉu ŝia paŝtisto estas bona homo.

Kaj ankaŭ pri la bieno estis multo rakontinda. Ne ĉiam ĝi estis

tiel mizera kiel nun. Ĝi estis tre vasta, sed la pli granda parto konsistis el marĉoj kaj ŝtonaj kampoj. Ne estis multe da loko por kulturitaj kampoj, sed ĉie estis bonegaj herbejoj. Estis iam tempo, kiam la staloj estis plenaj de bovinoj. Kaj en la domo kaj en la staloj loĝis ĝojo kaj gajeco. Malfermante la stalpordon, la mastrino ĉiam kantante envenis, kaj ĉiuj bovinoj pro plezuro ekmuĝis aŭdante ŝin.

Sed mortis la mastro, kaj la infanoj ankoraŭ ne povis labori; la mastrino devis transpreni la bienon kun la tuta laboro kaj zorgo. Ŝi estis forta kiel viro, kaj plugis kaj rikoltis. Vespere venante en la stalon, ŝi estis ofte tiel laca, ke ŝi ekploris. Sed pensante pri la infanoj, ŝi ree iĝis gaja. Tiam ŝi forviŝis la larmojn kaj diris: „Estas nenio. Kiam la infanoj grandiĝos, mi vivos pli bone!”

Sed kiam la infanoj estis grandaj, stranga deziro okupis ilin. Ili ne volis resti hejme, sed formigris al fremdaj landoj. La patrino neniam ricevis helpon de ili. Kelkaj infanoj geedziĝis antaŭ la formigro kaj ili lasis siajn infanojn ĉe la patrino. Kaj tiuj infanoj iris kun la mastrino tra la staloj kiel iam la gepatroj. Ili paŝtis la bovinojn kaj fariĝis bonaj, bravaj homoj. Kaj vespere, kiam la virino estis tiel laca, ke ŝi preskaŭ ekdormis dum la melkado, ŝi ree gajiĝis pensante pri ili. „Fariĝos pli bone por mi,” ŝi diris kaj forfrotis la dormon el la okuloj, „kiam ili estos pli grandaj.”

Sed tiam la infanoj foriris al la gepatroj en la fremda lando. Neniu el ili restis, neniu revenis. La maljuna virino sola postrestis sur la bieno. Neniam ŝi petis ilin resti ĉe ŝi.

„Ĉu vi opinias, Ruĝlino, ke mi devas peti ilin resti, kiam ili deziras formigri en la mondon kaj trovos bonan vivon?” ŝi kutimis diri al la maljuna bovino. „Ĉi tie en Smaland ili trovos nur malriĉecon.”

Sed kiam la lasta nepo foriris, la mastrino fariĝis malforta. Subite ŝi kliniĝis kaj griziĝis kaj ŝancele iris, kvazaŭ ne povante bone movi sin. Kaj ŝi laboris ne plu. La bienon kaj la domon ŝi malzorgis kaj la bovinojn ŝi vendis. Nur la maljuna bovino, kiu nun parolis kun la koboldo, restis. Ĉi tiun ŝi ne vendis, ĉar ĉiuj infanoj ĝin konis.

Certe ŝi povis dungi geservistojn, sed fremdajn homojn ŝi ne toleris ĉirkaŭ si, nun kiam ĉiuj familianoj ŝin forlasis. Kaj eble ŝi preferis, ke la bieno malprosperu, ĉar neniŭ el la infanoj trans-

prenos ĝin. Ili ofte skribis kaj petis ŝin veni al ili, sed tion ŝi ne volis. La landon, kiu forlogis de ŝi la infanojn, ŝi ne volis vidi. Ŝi malamis ĝin.

„Mi estas malsaĝa, ke mi ne povas ami tiun landon, kiu por ili estas bona,” ŝi diris. „Sed mi ne volas vidi ĝin.”

Neniam ŝi pensis pri io alia ol la infanoj kaj ilia foriro. Somere ŝi kondukis la bovinon eksteren por paŝti ĝin sur la granda marĉo. Ŝi mem sidis la tutan tagon ĉe la rando kun la manoj ripozantaj sur la sino; kaj irante hejmen ŝi diris: „Ĉu vi komprenas, Ruĝlino, se estus ĉi tie grandaj, bonaj kampoj anstataŭ ĉi tiu malfekunda marĉo, tiam ili ne bezonus esti foririntaj.”

La lastan vesperon ŝi estis pli malforta kaj pli tremanta ol iam antaŭe. La melkadon ŝi devis ĉesi. Ŝi apogis sin al la muro, kaj rakontis, ke du kampuloj venis al ŝi por aĉeti la marĉon. Ili intencis endigigi kaj senakvigi ĝin. Tio timigis, sed samtempe ĝojigis ŝin.

„Ĉu vi aŭdis, Ruĝlino?” ŝi diris, „ĉu vi aŭdis, ke aveno povos kreski sur la marĉo? Nun mi skribos al la infanoj, ke ili hejmen venu. Ili ne plu forrestu. Ili povos gajni la vivpanon ĉi tie.”

Por skribi tiun leteron, ŝi reiris al la domo.

La knabo ne plu aŭskultis la rakonton de la bovino. Li malfermis la stalpordon, transiris la korton al la ĉambro de l'mortinto, kiun li antaŭ momento multe timis. Komence li silente ĉirkaŭrigardis.

La ĉambro ne estis tiel mizera, kiel li antaŭe supozis. Ĝi havis riĉan provizon da ĉio, kion oni kutime trovas ĉe homoj kun parencoj en Ameriko. En angulo staris balancoseĝo amerika, sur la tablo kuŝis multkolora tapiŝo pluŝa, bela ornamkovrilo kuŝis sur la lito kaj sur la muroj pendis portretoj de la infanoj kaj genepoj en belaj kadroj, dum sur la komodo altaj vazoj staris kaj du kandelingoj kun dikaj tornitaj kandeloj.

La knabo serĉis alumetojn kaj lumigis la kandelojn, ne por pli bone, vidi, sed por tiel honori la mortinton.

Tiam li proksimiĝis, fermis ŝiajn okulojn, krucigis ŝiajn brakojn sur la bruston kaj forŝovis la maldensajn, grizajn harojn de sur la vizaĝo. Li sincere malĝojis, ke ŝi devis pasigi sian maljunaĝon en soleco kaj sopiro. Nun li maldormos ĉe ŝi en tiu ĉi nokto.

Li serĉis kantanon kaj duonlaŭte legis kelkajn psalmojn. Sed meze li haltis: li pensis pri siaj patro kaj patrino.

Neniam li sciis, ke gepatroj tiom multe povas sopiri al siaj infanoj! Imagu, ke liaj gepatroj sammulte sopiras al li, kiel ĉi tiu maljuna virino al siaj infanoj!

Li eksentis ĝojon pro tiu penso, sed ne kuraĝis kredi ĝin. Li ne estis tia, ke iu povas sopiri al li, sed eble li povos fariĝi tia.

Ĉirkaŭe li vidis la portretojn de tiuj, kiuj foriris: grandaj, fortaj geviroj kun seriozaj mienoj; fianĉinoj kun longaj vualoj kaj sinjoroj en belaj kostumoj kaj infanoj kun bukloharoj kaj blankaj robetoj. Kaj li opiniis, ke ĉiuj rigardas kiel blinduloj kaj ne volas vidi.

„Kompatinduloj!” diris la knabo al la portretoj. „Via patrino mortis. Vi ne povos rebonigi tion, ke vi ŝin forlasis. Sed mia patrino vivas.”

Tiam li iom haltis kaj ridetis.

„Mia patrino vivas,” li diris. „Miaj gepatroj vivas ambaŭ.”

trad. VANE.

LA VAGABONDO.

En M., malgranda urbo ne malproksime de la germana-ĉehoslovaka landlimo, loĝas plejparte bonkoraj homoj, ĉiam pretaj por subteni la bedaŭrindajn vagabondojn. Sed precipe bonfarema estis poeto Sefer, kiu babiladis kun ĉiu vagabondo, demandis pri liaj profesio, gepatroj, familio, gefratoj kaj donacis al li laŭbezone panon, tagmanĝon, monerojn aŭ eĉ tranoktadon.

Certe estas, ke pro tio multaj almozuloj vizitis la urbon. Sed la urbestro estis malamiko de migruloj. „Ĉar,” li diris „ili ŝtelas, rabas, bruligas garbejojn, ja okaze eĉ murdas.”

Pri tio li iutage malpermesis subteni la vagabondojn, minacante, ke ĉiu urbano, kiu denove riskos fari tion, devos pagi kiel punon mil markojn, aŭ iri en malliberejon por unu monato.

Nu, la urbestro estis preskaŭ amiko de la poeto Sefer, kaj ofte ili vespere kunsidis en la sama restoracio ĉe la sama gastotablo por interbabili. Sed kiam iuvespere la urboĉefo rakontis pri sia plej malmilda edikto kontraŭ la vagabondoj, Sefer ekstaris kaj forlasis la gastejon senvorte.

La sekvintan matenon jam tre frue venis la poeto al la urbestro, dirante: „Nun mi estas la unua, kiun vi povas puni per malliberigo, ĉar mil markojn mi bedaŭrinde ne posedas. Pasintan nokton venis en mian domon vagabondo, kiu ne havis monon, eĉ ne ĉemizon, kaj kiu ne povis paroli la germanan nek la ĉeĥan lingvon, kaj li tre frostotremis; do mi, kiel kristano, ne povis ne gastigi lin, — ĉu eble vi povus rifuzi tian homon?”

Urbestro: „Kaj kie li nun estas?”

Poeto: „Ankoraŭ en mia domo.”

Urbestro: „Mi volas vidi lin. Do mi akompanos vin kun du policistoj, kiuj konduku lin ĝis la landlimo; ĉar ĉi tie li ne povas resti.” Kiam ili estis en la laborĉambro de la poeto, la urbestro eksidis ĉe la skribotablo kaj protokolis: „Do, via vagabondo alvenis pasintan nokton? Li estis sen mono, sen ŝuoj, eĉ sen ĉemizo? Li frostis kaj malsatis, ĉu ne?”

Sefer: „Jes, tiel estis.”

Urbestro: „Sed kie estas via edzino? Mi volas esplordemandi ankaŭ ŝin.”

Poeto: „Ho, lasu ŝin ankoraŭ dormi; ŝi estas ne tute sana!”

Subite ekaŭdiĝis el apuda ĉambro mallaŭta krietado, kvazaŭ de bebo. La urbestro demandis mirigite: „Laŭ mia scio vi ne havas infanojn. Do, kion signifas tiu krietado?”

Poeto: „Nu, jen ĝuste la vagabondo! Li alvenis pasintan nokton sen ĉemizo, sen mono; li ne parolis la germanan nek la ĉeĥan lingvon; li frostis kaj malsatis; kiel vi ĵus protokolis!”

Tiam la urbestro ofendite ekstaris kaj forlasis la domon ne dirante adiaŭvorton; sed la du policistoj kaŝridante sekvis sian estron.

El „Heroldo de Esperanto”.

trad. M. HENRICH.


LA SOLVOJ EL NO 8.

2. Malbonhumora (humana-laboro-mano)

	1	2	3	4
1	p	o	s	t
2	o	b	e	i
3	s	e	ĝ	o
4	t	i	o	m


S.ro M. Breel, Koudekerke (Ned) kaj S.ro H. Melisie, Alphen a/d Rijn (Ned) gajnis premion pro la enigmoj. S.ro K. Akkermans, Nieuwendam (Ned) kaj S.ro Androliĉ Dragutin, Gjelekov (Jugosl) ricevis premion pro verkaĵo laŭ la bildo en No 8.

ENIGMOJ.



c, c, d, e, e, i, i, k, k, o, o, o, o, p, p, r, r, s, s, u. La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale:

1. malgrandan besteton. 2. longvostan beston, vivanta sur arbo.



n, n, o, r, r, u, u, u. La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale:

1. ciferon; 2. adverbon; 3. beston.

Riga (Latv) B. REICHBERG.

Gjelekovec (Jugosl)

ANDROLIN.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 3 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis 15 Junio.

RUSA ENIGMO.

En iu regno regis jena tradicio: Ĉiu krimulo, kondamnita je ekzekuto, rajtis antaŭe loti.

Tiu lotado donis al li ŝancon savi sian vivon. En nigran keston oni metis du paperetojn: Unu kun la vorto „vivo”, la dua kun „morto”. Se la kondamnito prenis la unuan papereton, oni tuj liberigis lin, sed se li prenis la duan, oni realigis la ekzekuton.

Okazis, ke iu homo en tiu regno havis multajn malamikojn. Ili kalumniis lin, kaj atingis, ke la juĝistaro kondamnis la malfeliĉulon je ekzekuto. Sed la malamikoj faris pli: Ili eĉ ne volis lasi al la homo la ŝancon saviĝi per lotado. En la nokto antaŭ la ekzekuto ili sekrete elkestigis la papereton kun la vorto „vivo” kaj ŝanĝis ĝin per papereto kun „morto”. Tiamaniere estis en la kesto du paperetoj kun „morto”. La malamikoj opiniis, ke nun la malfeliĉa homo ne povos liberiĝi.

Sed — tiu homo ankaŭ havis amikojn, kiuj avertis lin pri la falsitaj lotoj. La amikoj persvadis lin rakonti ĉion al la juĝistoj. Sed li tre petis ilin, silenti pri la afero. Li asertis ke nur tiel li saviĝos.

Matene la kondamnito diris nenion pri la falsaĵo al la juĝistoj. Li prenis loton el la nigra kesto kaj — la juĝistoj liberigis lin!

Sed kiel li liberiĝis el sia, ŝajne senelira, situacio?

Nikolaev (Sovetio).

El la rusa lingvo trad. V. Gruŝĉinsky.

Kiu scias, kiel la malfeliĉulo evitis la morton?

Skribu vian opinion pri tio al Red. „La Juna Vivo”, kaj inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos du premiojn!

Al la abonantoj de „LJV”, kies abonoj finiĝos 1 Julio '37.

Ĉiu abonanto, kiu pagos sian jarkotizon al „LJV” antaŭ 15 Junio '37, profitos la ŝancon gajni unu el jenaj belaj libroj, kiujn ni lotumos inter la frupagintoj (ankaŭ novaj abonantoj, kiuj pagos sian kotizon antaŭ la menciita dato rajtas partopreni): La Aventuroj de Marteno Drake, Hamleto, Lingvaj Respondoj, Fabeloj de Andersen, La Verbo en Esperanto, El la Nebulo, Imenlago, Verama Raporto pri la German-Molsa Milito, Mimi Pinson, La Interrompita Kanto, La Fundo de l'Mizero, Mia Poezio, kelkaj binitaj jarkolektoj de „LJV” No 3, Internaciaj kantaroj „LJV”, Internaciaj lernolibretoj, ktp.

Per via tuja pago vi do povas gajni belan Esperanto-verkon, kaj vi multe plifaciligos nian taskon.

PIULINO.*

Gaje.

Ho car-ma pi-u-li-no, Vi dancu ja kun

mi. „Ho ne”, ŝi diris laŭ-te, Ne-niam dancas mi.

Mi ne darfas, Mi ne povas, Danci de-cas

ne al mi; Sed pre-gi vo-las mi por vi.

Ho dancu piulino,
 Mi donos bovon al vi.
 „Ho ne”, ŝi diris dolĉe,
 Mi dancos ne por tri.
 Mi ne darfas,
 Mi ne povas,
 Danci decas ne al mi.
 Sed preĝi volas mi por vi”.

Ho dancu piulino,
 Edzino igos vin mi.
 „Ho jes,” ŝi kriis rave,
 Mi ĉiam dancos kun vi,
 Gaje dancos,
 Kune saltos,
 Karulo premu min al vi,
 Ĉar danci plaĉas tre al mi.”

Trad. VAN YSELSTEIN.

*) El: Internacia Kantaro „La Juna Vivo” (vidu paĝ. 157).

Por komencantoj.

RENKONTE AL PRINTEMPO.

Mi hodiaŭ proklamas printempo-alvenon.
 Min hodiaŭ kaŝite kisis vento de Maj',
 Kaj en koro, post vintra funebra psalmado,
 Jam denove ekkantis violono de gaj'.
 Donu manon, ni marŝos laŭ stratoj lazuraj,
 Ni, infane senzorgaj kaj ruĝvangaj pro rid';
 De krepusk' vualitaj ni al tag' foriranta
 Kun rideto mansignos: „Ĝis baldaŭa revid'!”

Riga (Latv)

LUDMILA JEVSEJEVA.

LA RUZA ELSO.

Kiam la ruza Elso estis plenkreska, ŝia patrino diris: „Nun ŝi povas edziniĝi.”

„Jes”, respondis la patro, „se ni sciuz edzon por ŝi.”

Fine venis viro de tre malproksime. Li nomiĝis Hans kaj diris, ke li deziras edziĝi kun Elso, se ŝi estas vere tre saĝa.

„Nu, tion vi spertos”, diris la patro.

Kaj la patrino diris: „Elsu povas vidi la venton, kiu marŝas sur la strato, kaj ŝi povas aŭdi le muŝojn, kiam ili tusas!”

„Mi vidus”, diris Hans, kaj li restis por manĝi.

Kiam ili finmanĝis, la patrino diris al Elso: „Iru en la kelon kaj alportu iom da biero.”

La ruza Elso prenis bierkruĉon kaj iris al la kelo. Kiam ŝi estis tie, ŝi prenis seĝeton, metis ĝin antaŭ la bierujon, kaj eksidis, ĉar ŝi ne volis klini sin. Post tio ŝi metis la kruĉon sub la barelon kaj malfermis la kranon. Dum la biero fluis en la kruĉon, Elsa ĉirkaŭrigardis, por ke ŝi ne enuu. Subite ŝi vidis sur la barelo grandan tranĉilon, kiun la masonistoj erare lasis tie. La ruza Elso ekploris. „Ho”, ŝi pensis, „se mi edziniĝos kun Hans, kaj naskiĝos infaneto, kiu grandiĝos, kaj ni poste sendos ĝin en la kelon por preni bieron, tiam eble tiu tranĉilo falos sur ĝian kapon kaj mortigos ĝin!” — Kaj ŝi ploradis kiom eble plej laŭte pro la estonta akcidento.

En la ĉambro oni atendis la bieron, sed ĉar la ruza Elso ne revenis, la patrino ordonis la servistino: „Iru al la kelo, kaj vidu, kie restas Elso!”

La servistino iris, kaj vidis Elson, kiu laŭte ploris antaŭ la bar-elo.

„Kial vi tiom ploras?” demandis la servistino.

„Mi ja devas plori”, respondis Elso, „se mi edziniĝos kun Hans, kaj naskiĝos infaneto, kiu grandiĝos, kaj se ni sendos ĝin en la kelon por biero, tiam eble tiu tranĉilo falos sur ĝian kapon kaj mortigos ĝin.”

„Kiom ruza nia Elso estas!” diris la servistino, ŝi eksidis apud Elso kaj kunploris pro la akcidento.

Post kelka tempo, kiam ankaŭ la servistino ne revenis, la patro diris al la servisto: „Iru por vidi, kial Elso kaj la servistino ne revenas.”

Kiam la servisto venis en la kelon kaj vidis la plorantajn knabinojn, li nature demandis, kio okazis. Do Elso rakontis ankaŭ al li pri la akcidento, kiu post kelka tempo eble povus okazi. „Kiom ruza nia Elso estas!” kaj ankaŭ la servisto eksidis, apud la servistino, kaj ploris kun ili.

En la ĉambro oni ankoraŭ atendis la bieron. Fine la patro diris: al la edzino: „Iru por vidi, kial nia filino restas tie.”

La virino iris kaj vidante la plorantan trion ŝi demandis pri la kaŭzo. Kiam ŝi aŭdis tion, ankaŭ ŝi kriis: „Nia Elso estas tre ruza!” Ŝi eksidis apud Elso kaj ploris, se eble, ankoraŭ pli laŭte ol la aliaj.

En la ĉambro ankoraŭ ne estis biero!

„Mi mem vidos, kio okazis,” diris la patro. Li iris al la kelo, kaj ege miris, kiam li vidis la plorantajn. Kaj kiam Elso diris, kial ŝi timas, li ekkriis: „Kiom ruza nia Elso estas!”, kaj li tutkore kunploris kun ili.

Dume Hans sidis sola apud la tablo kaj post iom da tempo li pensis: „Mi iru en la kelon, eble ili atendas min”. Kiam li venis en la kelon li vidis la kvin plorantajn, kaj demandis: „Kia malfeliĉo okazis?”

„Ho, kara Hans”, ĝemis Elso, „se ni post kelka tempo geedziĝos kaj ni havos infanon, kiu grandiĝos, kaj ni sendos ĝin en la kelon por preni bieron, tiam eble tiu tranĉilo falos sur ĝian kapon kaj mortigos ĝin. Ĉu tio ne estas plorinda?”

„Nu,” diris Hans, „pli da saĝo vi ne bezonos por la mastrumado.”

Li edziĝis kun Elso.

Tasko:

- I. Lernu parkere „Renkonte al Printempo” kaj deklamu ĝin.
- II. Traduku en vian gepatran lingvon „La ruza Elso” kaj rakontu la enhavon per propraj vortoj.
- III. Lernu parkere kaj traduku jenajn proverbojn: Lernu juna, vi scios maljuna. — Granda nuboj, malgranda pluvo. — Eĉ kiu plej bone pafas tamen iam maltrafas. — Akvo trankvila estas akvo danĝera. — Kie fumo leviĝas, tie fajro troviĝas.
- IV. Faru verkaĵon laŭ unu el jenaj temoj: Mia hejmo. — Esperanto-kongreso. — Mia metio.

Inter la sendintoj de la plej bonaj verkaĵoj ni disdonos 2 premiojn. Ni atendas la verkaĵojn antaŭ 1 Julio.

LA DUDEK SEPA LECIONO.

A. Tikli ies orelojn.

Ŝajnas, ke mia vido ĉiutage pli malboniĝas,” diris lernanto al sia mastro, „mi ne plu povas vidi, ĉu estas butero sur mia pano.

La mastro riproĉis sian avaran edzinon, kaj diris, ke ŝi donu iom da fromaĝo sur la buterpanojn de la knabo.

Kiam la knabo rericevis la manĝaĵon, li ĝoje ekkriis: „Ho, mastro, nun mi subite rehavas la vidkapablon! Mi nun povas vidi la buteron tra la fromaĝo!”

B. La venĝo.

Kelkaj kamparanoj sidis en vagonaro. Unu el ili metis sian ĉapelon sur benkon. Ĉe la sekva stacio envenis sinjoro, kiu senatente eksidis sur la kapveston. La posedanto furioze mienis. La sinjoro petis pardonon kaj proponis pagi la ĉapelon. La kamparano ne respondis.

„Se vi ne volas akcepti monon, mi pretas iri kun vi al butikoj, por aĉeti novan,” humile proponis la pekulo.

La viktimo obstine silentas.

„Eble vi ne ŝatas iri nudkape? Prenu mian, ĝis ni aĉetis alian!”

Silento. Senespere la sinjoro rigardas ĉirkaŭe. Unu el la kamparanoj kompatis lin.

„Karlo”, li diris al sia amiko, „La sinjoro ja ne intence eksidis sur vian ĉapelon. Kaj li deziras pagi ĝin! Kial vi tiel obstine silentas? Kion vi do volas?”

„Mi volas sidi sur lia ĉapelo!” estis la venĝema respondo.

a. Kopiu, traduku kaj lernu la novajn vortojn. b. Laŭtlegu la lecionon. c. Kopiu kaj traduku A kaj B kaj rakontu la enhavon per propraj vortoj. d. Respondu al jenaj demandoj:

A. Kies vido ĉiutage pli malfortiĝas? Kion la knabo ne plu povis vidi? Kia estis la edzino de la mastro? Kial la mastro riproĉis la edzinon? Kion li postulis? Ĉu la virino obeis? Kion la knabo ricevis? Ĉu estis multa fromaĝo sur la buterpanoj?

B. Kiuj sidis en vagonaro? Kio kuŝis sur la benko? Kie envenis la sinjoro? Kio okazis? Ĉu la kamparano estis pardonema? Kion la sinjoro proponis? Ĉu la farmisto akceptis? Kion la sinjoro poste proponis? Kion la kamparano respondis? Kia la sinjoro fine estis?

Kiuj kompatis lin? Kion ili faris? Kion deziris la posedanto de la ĉapelo?

LA DUDEK OKA LECIONO.

A. Senpage razata.

En razejo venas malriĉulo kun dense stopla barbo. Anstataŭ almozo li petas, ĉu la barbiro pretas senpage, razi lin, por ke li iom dece aspektu.

La mastro prenas la plej maltaŭgan razilon, kiun li posedas, pensante: „Kial mi malakrigos bonan tranĉilon sur tia stoplejo. Mi ja faras tion senpage!”

La kompatindulo ne kuraĝas kriet, kvankam li suferegas.

Dume hundo en la ĝardeno terure ploras. La mastro diras: „Kio estas al tiu hundo. Kial ĝi tiom kriaĉas?”

„Mi ne scias,” respondas la servisto.

„Ankaŭ mi ne,” diras la edzino.

Sed la kompatindulo sub la tranĉilo ĝemas: „Eble la kompatinda besto estas senpage razata, same kiel mi!”

B. **Libraĉo** = malbonkvalita libro, **rakontaĉi** = mallerte rakonti, **parolaĉi** = kriple paroli, **skribaĉi** = malbele skribi, **viraĉo** = viro, kiu malzorge aspektas.

Aĉ montras, ke iu aŭ io estas malbela, malbonkvalita.

C. **Filibro** = malbona libro (la enhavo estas malbona), **fivirino** = malvirta virino, **fihundo** = malica hundo (hundo, kiu mordas), **Fi** montras malestimon, malŝaton.

D. Razata viro = viro, kiun oni razas.	Bakata pano = pano kiun oni bakas.
Razita viro = viro, kiun oni razis.	Bakita pano = pano, kiun oni bakis.
Razota viro = viro, kiun oni razos	Bakota pano = pano, kiun oni bakos.
Ludanta knabo = knabo, kiu ludas.	Naĝanta homo = homo, kiu naĝas.
Ludinta knabo = knabo, kiu ludis.	Naĝinta homo = homo, kiu naĝis.
Ludonta knabo = knabo kiu ludos.	Naĝonta homo = homo, kiu naĝos.

Bojanta hundo, brulantaj domoj, forkurintaj homoj, aperonta libro, forveturonta vagonaro, velkintaj floroj, batita hundo, trovita pomo, punata knabo, tranĉota pano, arestita ŝtelisto, eksportotaj varoj, malfermota kongreso, presita libro, vendataj lernolibroj.

a. Kopiu, traduku kaj lernu la novajn vortojn. b. Laŭtleĝu la lecionon. Kopiu, kaj traduku A, B, C, D, E en vian kajeron. d. Rakontu la enhavon de A per propraj vortoj. e. Respondu al jenaj demandoj:

Kial la malriĉulo eniris la razejon? Kia estis lia barbo? Ĉu li petis almozon? Kion li petis? Ĉu la razisto plenumis la deziron? Kian razilon li prenis? Kial li prenis maltaŭgan razilon? Kion diris la malriĉulo? Kio okazis en la ĝardeno? Ĉu la servisto sciis, kial la hundo ploras? Kion diris la malriĉulo?

E. Kontraŭmilita, kontraŭstaro, antaŭhieraaŭ, onidiro, plenplena, antaŭlasta, senseca, laŭvorte, laŭpove, laŭdire, duvoĉa, dusenca, kapmovo, kvarpiedulo, punmono, monpuno, pundomo, kudrolaboro, temporaba, senpacienca, konstruplano, aerŝipo, samaĝa, plenaĝa, grandaĝa, ambaŭflanke, senenergia, laŭtleĝi, subtera etaĝo, meritplena, ĉerizarbo, tutkore, preseraro, pruntedoni, movoforto.

LUDO (Klaĉi).

La klubanoj staras aŭ sidas en du vicoj, vizaĝ' al vizaĝo. Je signo de l'gvidanto ĉiu paro komencas vikle paroli. Subite la gvidanto fajfas mallonge. Tiu, kiu diras la lastan vorton, estu punata en konvena maniero. Li (aŭ pli verŝajne: Ŝi!) ekz. devas rakonti spritan anekdoton, tuj aŭ en la sekvanta kunveno.

Buinen (Ned)

M. MEDEMA.

AL SVISUJO KAJ PARIZO.

(vidu la ĵanuaran numeron de „La Juna Vivo”).



Kastelo ĉe la lago de Ĝenevo.


La nombro de la partoprenontoj regule kreskas. Estas jam pli ol 30, inter kiuj 6 angloj.

Estas kelkaj personoj, kiuj turnis sin al mi kun la demando, ĉu ne-esperantistoj ankaŭ rajtas partopreni. Mi konsilis al ili tuj komenci la studadon. Kvino da ili nun fervore studas.

La redakcio afable petas al ĉiu, kiu ankoraŭ ne pagis la garantisumon (10 guldenoj), fari tion antaŭ 1 Majo.



Lago en la Vasgoj (Vogezen).



Grand-Combin, unu el la plej altaj montoj de la Alpoj (4371 M). Ĝi jam estas videbla de Weizenstein.

GRAVA ELDONO.

En Oktobro 1936 la gazetaro de la tuta mondo komunikis, ke en la internacia roman-konkurso, kiun aranĝis la agentejo Pinker en Londono kune kun 14 grandaj libro-eldonejoj, la premion de 4.000 funtoj sterlingaj (36.000 gld.) gajnis la hungara verkistino S.ino Jolan Földes per sia romano fitolita „La strato de fiŝkaptanta kato”.

S.ro Vilhelmo Bleier, la eldonanto de „Literatura Mondo” en Budapeŝto, vizitis la feliĉan verkistinon por paroli kun ŝi pri Esperanto.

Dum la intervjuo S.ino Földes malkaŝis, ke ŝi ne nur alte taksas kaj ŝatas Esperanton, sed eĉ bone komprenas ĝin, ĉar kiel universitata studentino ŝi tralegis tutan lernolibron de Esperanto kaj poste pro veto sen vortaro tradukis unu tutan Esperanto-lingvan novelon en hungaran lingvon.

Baldaŭ aperos ĉe „Literatura Mondo” la Esperanto-traduko de ĉi fama verko. La redakcio de „La Juna Vivo” jam nun akceptas antaŭmendojn.

Se eksterlandanoj grupe abonas la gazeton, ili pagas nur la nederlandan abonprezon.

KORESPONDADRESOJ.

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol du linioj.

Anglujo: N. R. Briant, 16 jara junulo, dez. kor. kaj interes. poŝtm. kun ĉiuj landoj. Adr: Greenbank, Fordingbridge, Hants.

Aŭstrio: Ferry Fibich, Hirtenberg, Nieder Aŭstrio deziras korespondi kun nordaj ŝtatoj. Certa respondo.

Belgujo: John Thery, Kasteelstr. 57, Antwerpen. Kiu sendas kvanton da poŝtm. (50—100—150 ĝis 500) tuj ricevos saman kvanton.

Danujo: 3 viglaj, 15 jaraj knabinoj dez. kor., interes. pm., il. pk, il. gaz. ktp. kun gejunuloj en ĉ.l.; G. Agerbo, R. Jensen, K. Midtiby, en Videbaek.

Germanujo: S.ro Albert Biermann, Wuppertal-B, Raŭental 68, ĉiam deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Afranku filatele.

Japanujo: Kiu instruisto en elementa aŭ mezgrada lernejo volas interŝanĝi kun ni desegnaĵojn aŭ skribaĵojn de lernantoj por ekspozicia celo? Adr: Osaka Esperanto-Societo, Higasi-umeda 28, Kitatu, Oosaka.

Jugoslavio: Ĉiu kiu sendas al mi diversajn poŝtm. ricevos 5—10 pejzaĝ-kartojn el Jugoslavio. Adr: Zupan Cvetko, Slomskova ul. 5, Jesenice, Dr. ban.

Nederlando: Kiuj gesamideanoj estas pretaj gastigi 22 jaran, senlaboran Esperantiston dum kelkaj tagoj? Li intencas vojaĝi bicikle tra: Belgio, Francio, Italio, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Danio dum Junio, Julio. Kaj kiu ned. Esperantisto estas preta kunvojaĝi? K.do M. Souverein, Venuslaan 69, Enkhuizen.

Nederlando: S.ro G. Blonk, Julianastr. 32, Overschie, dez. kor. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. Certe respondos.

Nederlando: K.do W. G. Paape, SELN-ano dez. kor. kun eksterlandaj samideanoj pri diversaj temoj. Soestdijksche Kade 986, den Haag.

Nederlando: 14 gejunuloj (12—16 jaraj) volonte korespondos kun grupo de 14 eksterl. samaĝaj Esperantistoj. S.ro H. v. Dam, Holleweg 30, Heiloo.

Nederlando: K.do J. Way, Hoogenweg, Uitgeest (N.H.) sendos 50 uzitajn poŝtm., al kiu sendos al li la samon. Certe respondos.

Nederlando: S.ro B. Karremans dez. korespondi kun Parizan(in)o(j), pro intenco viziti Parizon. Adr: Parko 3, Enkhuizen.

Norvegujo: Nia klubo la 18an de Majo aranĝos letervesperon. Helpu al ni kaj bonvolu skribi multnombre al: „Vojiĝanto”, Steinkjer.

Nederlando: 14 jara knabo deziras korespondi kun eksterlandaj gesamaĝuloj. Piet Meurs, West-Grafdijk (NH).

Anglujo: Gekursanoj de Guy B. Tordoff dez. kor. kun ĉiuj landoj. Adr: 113, Trym Side, Sea Mills, Bristol 9.

Nederlando: A. Kieviet, SELN-ano deziras korespondi kun eksterlandaj samideanoj. Walnootstr. 163, den Haag.

Nederlando: 6 geknaboj(grupe) k. 30 pli aĝaj dez. kor. pri ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj. Certe respondos. S.ro Jac. Vonk, Hanepad 48, Zaandam.

Belgujo: Ni organizos letervesperon, 5 Majo '37. „Flandrema Grupo Esperantista”, Klapdorp 103, Antwerpen. Ĉiu skribinto ricevos resp.

Ĉeĥoslovakujo: 50 gekursanoj deziras korespondi. Adr: Max Ultmann Boskovice, náměstí I.



NIA PLEJ GRANDA „JUNA VIVO” — GRUPO. SOMAIN — FRANCUJO.

Laŭ informo de la gvidanto ĉiuj geknaboj sukcese instruiĝas per la „Internacia Lernolibreto”. La plenaĝaj klubanoj grupe abonas 40 ekz. de la revuo „La Juna Vivo”. Ĉiuj dez. kor. Adr: S.ro Dussart, 67bis Rue Wilson.

RICEVITAJ ESPERANTAJOJ.

LA KONGRESLIBRO DE L.E.E.N. — 48 paĝa, riĉe ilustrita, perfektaspekta. — Estas bonvena donaceto por viaj eksterlandaj amikoj. Havebla po 15 c. ĉe S.ino Nykamp-de Jeeger, poŝtk. 292900, den Helder.

BEKNOPT ESPERANTO-WOORDENBOEK. — **A. G. J. v. Straaten.** 2.25 guld. Aperis ĉe W. Thieme, Zutphen. — Pro ĉi tiu eldono v. Straaten (kaj la Firmo Thieme) meritas la dankon de la nederlanda Esperantistaro. La nova vortaro estas preskaŭ samvalora kiel la pli ampleksa. La aŭtoro ellasis nur tiujn derivaĵojn, kiujn ĉiu Esperantisto mem povas trovi. Krome li ellasis nombron da nur tre malofte uzataj vortoj. — La prezo tamen ege malaltiĝis: 2,25 gld. vere estas nur ŝumeto por tia ampleksa, tolbindita, sur bona papero presita verko. Ni povas ĝin tre rekomendi.

LA AVENTUROJ DE MARTENO DRAKE. — **G. Norway.** Traduko de Walter Severn, eldono de Brita Esperanto-Asocio. (Prezo 1,75 guld.) — Estas historio el la komenco de la 18a jarcento (la tempo de sklaveco). Malriĉulo en Anglio, ano de kontraŭbandista bando, estas kondamnita al punlaboro en tiutempe angla kolonio en N. Ameriko. Liaj du filoj decidas transiri la oceanon por serĉi la amatan patron. Post longa vagado ili fine sukcesas. La libro rakontas pri iliaj travivaĵoj. — Precipe la junuloj englutos ĉi libron. Estas pro tio, ĉar la enhavo estas interesa kaj kortuŝa, kaj la stilo tre simpla. — La enhavo estas instrua en tiu senco, ke la legantoj lernas, kiom ege kruela estis la vivo de malriĉuloj en tiu tempo.

EL LA NEBULO — originale verkita de **Chr. Hougaard**, dua eldono. Eld. „Dansk Esperanto-Forlag. Facila legolibro, 23 paĝa. Prezo: 0,20 gld.

LA GRANDAJ FILOZOFOJ (1), RUSAJ NOVELOJ (2), DE MUHEDDIN GIS MUNDILATIN (3). 3 libretoj, 32 paĝaj. Eld. Esperanto-Eldonejo J. Muusses, (MEB), Purmerend (Ned). La verketoj estas redaktataj de: J. Glück, T. Jung kaj J. H. J. Willems. Prezo: po 0,35 gld.

PRI LA MARBORDA ESPERANTO-RESTADO INTERNACIA EN FUGLSÖ.

Fuglsö situas sur duoninsulo oriente de la urbo Aarhus en la provinco Jutlando, meze en Danlando. — Ĉirkaŭ la restadloko estas tre belaj altaĵoj kun unika videblo al la proksima maro. La restadejo konsistas el 15 konstruaĵoj lignaj, el kiuj du estas dormejoj kun entute 320 dormlokoj. La lito estas aranĝitaj laŭ la pendlita sistemo en 3 etaĝoj. Ĉiu lito havas spiral-matracon kaj someran litaĵon (littuka saketo kaj kovriloj). En ĉiu barako estas lavejo: Plie ni disponas pri unu barako kun entute 20 dulitaj ĉambroj.

Kuirejo kaj manĝejo povas prizorgi 250 personojn. Cetere leg- kaj restad-salonoj, gimnastikejo, ludejoj, garaĝoj ktp. estas je nia dispono. La distanco al la marbordo estas nur 15 piedminutoj. Sur la sablo de la marbordo estas ligna vestarejo kaj en la akvon longa banponto. La marbordo apud la sablo estas alta kaj dekliva kun arbaretoj. — **Paradizo por banemuloj!**

Dum la marborda Esperanto-restado okazos:

- a. **Esperanto-kursoj** (komenc- kaj daŭriga).
- b. **Paroladoj**. Ĉiutage okazos parolado pri internacia temo en Esp.
- c. **Komunaj kanthoroj**. S.ro H. Grönborg instruas Esperanto-kantojn.

Cetere oni povas pasigi la tempon ankaŭ kiel **feria gasto**, partoprenante nur la amuzojn kaj la ekskursojn.

Aliĝis karavano de Nederlando per S.ro G. H. M. Kat, Leeuwarden, Spoorstraat 142, kiu en kunlaboro kun S.ro H. Grönborg aranĝas interŝanĝon de danaj kaj nederlandaj Esperantistoj per aŭtobuso, tiel, ke la vojaĝprezo inter la du landoj, tien kaj revenan nur estas 14 gld. Oni ankaŭ preparas karavano de Norveĝujo kaj Ĉeĥoslovakujo.

Pro alveno de infanoj al la restado marborda ni aranĝos specialan infankurson, gvidata de S.ro Aug. Weide el Hamburgo.

Eksterlandanoj, kiuj venos al Danlando, povos havi senkoston restadon en privataj hejmoj, kelkajn tagnoktojn diversloke. Skribu al S.ro H. Grönborg, Rosenvej 8, Risskov, kiu havas adresaron de danaj gastigantoj.

ANONCETOJ (30 c. por ĉiu linio).

ĈIU ESPERANTISTO NEPRE KONATIĜU KUN INTERNACIAJ GAZETOJ!

Por 0,50 gld. (3 resp. kup), oni ricevas 10 diversajn esp. gaz. **Red. „LJV”**.

MALKARAN, VARIAN LEGAJON trovas ĉiuj Esperantistoj en malnovaj noj de „LJV”. Por 0,20 gld. (2 resp. kup) oni ricevas 10 numerojn, laŭplaĉe samajn aŭ diversajn.

„LA JUNA VIVO”-TEATRAĴOJ. La plej efika maniero por paroligi komencantojn estas prezenti teatraĵojn. Multajn laŭdajn leterojn ni ricevis de ĉiuflanke pri la „Juna Vivo”-teatraĵetoj. Jam aperis:

„La novaj Vestoj de la Reĝo” (15-20 inf. aŭ plenaĝuloj, triakta)

„La elektraj Lampoj de la Sinjorino” (3 plenaĝuloj k. 2 inf., unuakta).

„La Naskiĝtago” (8 infanoj, triakta).

„Kion faras la Patro ĉiam estas bona” (8 plenaĝuloj aŭ inf., unuakta).

„La tro longa Pantalono” (4 plenaĝuloj aŭ infanoj, 2 akta).

Prezo: 0,10 gld. (1 resp. kup. Mendebla ĉe „La Juna Vivo” kaj ĉiuj Esperanto-librejoj.

PORINFANA LITERATURO EN ESPERANTO. Verkante novan „Konsilanton tra la Esperanto-movado” mi enmetis ĉapitron „porinfana literaturo en Esperanto”. Kun danko mi akceptus atentigon pri tiuspecaj verkoj (aŭtoro, tradukinto, eldonejo, nomo de la verko, jaro-prezoj). Ĉiu sendinto ricevos de mi libron. Skribu al: Julie Šupichová, Praha II, Malá Štěpánská 6, Ĉeĥoslovakujo.

INTERNACIA KANTARO „LA JUNA VIVO”. En Majo ni eldonos novan kantaron, kiu enhavos 35-40 kantojn kun muziknotoj. Parto el la kantoj jam aperis en „La Juna Vivo”, pro tio la libreto estos tre malkara.

Prezo: 0,35 gld., 1 Dan. kr, 0,8 Sv. kr, 0,9 ŝil., 4 fr. fr., 0,8 N. kr, 0,2 Dol., 0,7 Sv. fr. Legantoj, kiuj mendos la libreton antaŭ 1 Junio nur pagas 0,25 gld. **Kantu do, kaj per kantado propagandu por nia idealo!**

LITERATURA MONDO”. Pli ol mil libropagojn egalas tutjara kolekto de nia sola literatura gazeto. Jarabono 4,50 gld. Specimeno 0,20 gld.

La plej detalajn kaj objektivajn librokritikojn vi trovas en „**LINGVO-LIBRO”**, kvaronjara aldono al „LM”. Jarabono 0,80 gld. Ambaŭ revuoj estas mendeblaj ĉe „La Juna Vivo”.

„KANTAS LA HUNGARA SKOLTO”, kajero kun muziknotoj, hungaraj popol- kaj skoltkantoj. **Prezo:** 2 kajeroj por 0,45 gld., mendebla ĉe „LJV”.

ESPERANTA SOMERA LERNEJO estos organizata de la „grupo de Esperantistaj geedukistoj” dum Aŭgusto '37. Ĝi okazos en POISSY, urbeto proksime de Parizo. Oni vizitos la internacian ekspozicion: frataj, ĝojaj, instruaj libertempoj. Eksterlandaj geinstruistoj, vizitu la „Esperantan someran lernejon”. Petu sciigojn al: Micard, instruisto, Epineux-le-Seguain (Mayenne), Francujo.

FLANDRUJO INVITAS VIN! La 8a Flandra Kongreso de Esperanto ĉijare okazos en la famkonata urbo **Leuven** dum Pentekosto, de la 15a ĝis la 17a de Majo. La kotizo kaj aliaj kongresaj aĵoj estos malmultekostaj. La kongresanoj ankaŭ ricevos 35 % an rabaton sur ĉiu belga fervojlinio. Ĉiujn dezirotajn sciigojn oni bonvolu peti de la kongressekretario: Lode Cnops, Broekstraat 21, Heverlee (Leuven).

INTERNACIAJ FERIAJ ESPERANTO-KURSOJ en Helsingør, Danlando: **Prezo:** La restado dum unu semajna kurso kostas entute nur 18 gld. (kotizo, manĝo kaj loĝo en dupersona ĉambro). Petu informojn ĉe: S.ro L. Friis, Thyrasvej 15, Aabyhøj, Danlando.

NIAJ VIZAĜOJ. Sendependa kaj senpolitika monata revuo, bele ilustrita, sub redaktado de la verkisto Damjen Vahen, Ljubljana, Jugoslavio. Jarabonprezo: 0,75 gld. aŭ 6 resp. kup. Abonebla ĉe „La Juna Vivo”. Petu ĉe ni specimennon de ĉi tiu bela nova revuo. **Prezo 5 cendoj.**

LA TREZORO DE L'ORAJSTO, historia romano el la XVIa jarcento, de Aŭgust Senoa, kroata verkisto. Esperantigis Fran Kolar-Krom. 290 paĝojn. **Prezo:** 0,70 gld. aŭ 6 resp. kup. Mendebla ĉe „La Juna Vivo”.

RECENZOJ PRI LA INTERNACIA LERNOLIBRETO „LA JUNA VIVO”.

„*Pola Esperantisto*” (No 2 '37):Ĝi enhavas 15 lecionojn, kies tekstoj fariĝas laŭgrade pli kaj pli malfacilaj. Imitindan novaĵon formas 9 kantoj kun muziknotoj. La ilustraĵoj estas tre klaraj, kaj el grafika vidpunkto bonege reproduktitaj. La lingvo estas modela, vere Zamenhofa Esperanto, kaj pro tio mi, kiel ortodoksa „fundamentisto” legis la verketon kun granda plezuro.

Heroldo” (No 3 '37): La rekta metodo por instrui lingvojn estas nuntempe tre ŝatata. Kutime ĝi estas helpata per bildoj, objektoj, filmoj, gramofondiskoj ktp. En tiu metodo okupas gravan lokon la konversacioj, kantoj, ludoj, ŝercoj, enigmoj ktp. La libreto de E. v. Veenendaal-Bouwes estas tia libreto, kiu (en 15 lecionoj) donas materialon por rektmetoda kurso. Oni povas rekomendi la uzadon de tiu libreto, kiu cetere havas la avantaĝon de malalta prezo.

„*The British Esperantist*” (Marto '37): Oni eldonis en broŝura formo 15-lecionan rektmetodan kurson por komencantoj, kiu aperis en la monata gazeto „La Juna Vivo”. La verkintino raportas en sia antaŭparolo, ke ŝi kaj multaj kolegoj trovis la lecionojn tute taŭgaj en la praktika uzado. Kontraŭdiri tion rajtus nur tiu, kiu mem aplikus la metodon. El la legado mem oni konstatas, ke la lecionoj estas ilustritaj per desegnaĵoj kun cifereferencoj por helpi la lernantojn, kaj ke ili estas provizitaj per simplaj, mallongaj kantoj, (taŭgaj al la komencantoj), kaj instruaj ludoj.

„*Internacia Pedagogia Revuo*” (No. 2 '37): Kun granda ĝojo mi tralegis „La Juna Vivo”, ne la konatan monatan revuon de la sama nomo, sed internacian Esperanto-libreton. Ĝi enhavas 15 lecionojn por infanoj, laŭ metodo: lernado per imitado. La metodo jam estas provita per la samspecaj lecionoj en la revuo „LJV”. La materialo estas proponata al infanoj laŭ agrabla maniero: per bildoj, ludoj, kantoj, dialogoj kaj rakontoj. Mi opinias, ke kompetenta instruanto pere de tiaj lecionoj sukcesos kapti la daŭran intereson de siaj gelernantoj. Granda merito de la libreto estas ke ĝi donas poemetojn kaj malgrandajn prozaĵojn, kiujn la infanoj povos lerni parkere. Ni scias, ke ĉiu infano faras tion volonte, kaj ke tia ekzerco donas bonajn rezultatojn por la lernado de lingvoj. La redaktorino de „LJV” kiu prilaboris la lernolibron, sciigas en sia antaŭparolo ke la daŭrigo de la 15 lecionoj troviĝas en la dua jarkolekto de la revuo. Mi esperas, ke la debito de la unua libreto ebligos la eldonon de dua, daŭriga volumeto. Tiam niaj kursgvidantoj disponos pri taŭga materialo en faciluzeblaj libretoj.

Kursgvidantoj tuj petu specimenon de „Internacia Lernolibreto”! Prezo: Ned.: 0,20 gld.; Usono: 0,15 dol; Britujo: 6 p; Belgujo: 3 fr; Francujo: 2,5 fr; Svisujo: 0,4 sv. fr; Danujo: 0,50 kr; Ĉeĥoslovakujo: 3,5 Kĉs.

KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

Esp. grupoj en jenaj lokoj enkondukis „La Juna Vivo”n:
 La unuan jarkolekton en: Laren (Ned.), Angro do Heroismo. (Port.)
 La duan jarkolekton en: Oudorp (Ned.).
 La trian jarkolekton en: Bristol (Angl.), Soissons Franc.), St. Pölten (Aŭstr.).

„La Internacia Lernolibreto”n en: Tonsberg (Norv.), Tlemcen (Alĝerio), Ranum (Dan.), Aljustrel (Portugalujo), Apeldoorn, Epe, Leiden. (Ned.).

KORESPONDADO.

W. en Schattendorf (Aŭstr): Ni volonte ricevos novajn tradukaĵojn. Kelkaj el la laste senditaj jam antaŭe aperis.

H. en Sp. Nová (Ĉeĥ): Via rakonto ankoraŭ ne sufiĉas.

M. k. H. M. en Varsovio (Pol): Bonvolu sendi pli detalan adreson.

L. J. en Riga (Latv): Similajn rakontojn ni jam kelfoje ricevis.

V. Kr. en Riga (Latv): La rakonto ne taŭgas por infanoj.

E. P. en Tertu (Latv): Tro simpla.

M. M. en Riga (Latv): Ne taŭgas por ĉiuj legantoj.

J. J. R. en Soest (Ned): „La Oriolo” aperos. La aliaj ne sufiĉas.

Esperantaj gazetoj, aboneblaj ĉe ni:

<i>Verda Revuo</i> , monata ... jara	f 1,50	<i>Literatura Mondo</i> , monata jara	f 4,50
<i>Nia Gazeto</i> , monata	„ f 1,35	<i>Lingvo libro</i> , trimonata ..	„ f 0,80
<i>Scienca Gazeto</i> , dumonata ..	f 1,50	<i>Esperanto-Internacia</i> , mon.	„ f 2,50
<i>Heroldo de Esp.</i> , semajna ..	f 6,80	<i>Bulteno de I.S.A.E.</i> , dumonata, „ f 1,35
<i>The British Esp.</i> , monata ..	f 1,20	<i>Sennacieca Revuo</i> , monata ..	f 2,50

Specimenoj. Ni sendas senpage specimenon de „La Juna Vivo”. Specimeno de *Literatura Mondo* kostas 20 cendojn. Ni ĝenerale havas ekzemplerojn de la aliaj kaj volonte sendas ekz. al iu ajn interesato kontraŭ 5-cenda poŝtmarko holanda aŭ egalvaloro.

La „INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO”.

(oficiala organo de T.A.G.E.)

Jam eniris la 15an jaron de sia ekzistado.

Tio ja atestas, ke I.P.R. rajte ludas sian rolon en la esperanta gazetaro. Petu *tiuj* senpagan specimenon de la adm: P. KORTE, VEENDAM (Ned.)

MUUSSES ESPERANTO-BIBLIOTEKO

(RED: J. GLÜCK, T. JUNG,
J. H. J. WILLEMS)

La unua serio ampleksos 10 volumetojn. Unuopa volumeto kostas guld. 0.35; la tuta serio guld. 2.50 inkl. af-ranko.

Jam aperis:

1. La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo. De Julius Glück.
2. Rusaj rakontoj. De Lermontov kaj Mamin-Sibirjak.
3. De Muheddin ĝis Mundilatin. (Mondlingvaj projektoj tra la jarcentoj). De Teo Jung.

La ceteraj sep volumetoj aperos en rapida sinsekvo.

HAVEBLAJ ĈE: „LA JUNA VIVO”

KIAL

vendiĝas tiom multaj binditaj jar-kolektoj de

„LA JUNA VIVO”?

Ĉar tiuj libroj pro sia varia enhavo (por komencantoj kaj por progresintoj) fariĝas nepre bezonata studilo en ĉiuj kurs- kaj grupvesperoj!

Prezo: 1,6 sv.fr. = 0,75 gld. Grupoj kaj abonantoj ricevas rabaton.

La plej legata — la plej enhava
la plej malkara estas

NIA GAZETO

monata, grandformata, ilustrata.

Direktoro-ĉefredaktoro:

GEORGES AVRIL.

Jarabono: 15 fr. fr. (f 1,35).

Petu specimenon ĉe „La Juna Vivo”
(kontraŭ 5 cenda poŝtmarko)

SKRIBA KURSO

por A. kaj B.

(nur por holandlingvanoj).

Tre detala B-kurso. Gvidanto

Simon Aarse.

Petu senpagan prospekton, Ĉiu kandidato sukcesis.

**La Verda Stelo, Radioweg 45,
Amsterdam-O.****JARKOTIZO:**

Ameriko: 0,70 dol.; **Aŭstrio:** 3,20 ŝil. **Britujo:** 3 ŝil.; **Belgujo:** 17 fr. fr.; **Bulgarujo:** 50 lev.; **Ĉeĥoslovakujo:** 16,50 Kĉs.; **Danujo:** 3 kr.; **Estonio:** 2,50 est. kr.; **Finnlando:** 30 finn. mk.; **Francujo:** 11 fr. fr.; **Germanujo:** 2 M.; **Italujo:** 8,3 ital. lir.; **Japanujo:** 2,50 jap. jen.; **Jugoslavio:** 30 din.; **Latvujo:** 2,5 l.; **Norvegujo:** 2,7 kr.; **Polujo:** 3,6 zl.; **Portugalujo:** 15 port. esk.; **Svedujo:** 2,70 kr.

La ĉarma „verda” Danlando vokas vin al:

**„MARBORDA ESPERANTO-
RESTADO INTERNACIA”**

en:

Fuglso, Aarhus,

de la 18a ĝis la 28a de Julio.

Plena pensio: 13 gld.

Ĉiaj informoj ĉe **S.ro Harald Grönborg, Risskov, Danlando; S.ro August Weide, Hamburgo (Germ), kunlaboranto.****BULTENO**

de

Int. Scienca Asocio Esperantistadumonata, ilustrita revuo,
16 paĝoj, granda formato.
Jarabono 1,35 gld.

Abonebla ĉe „La Juna Vivo”

Petu specimennon!

BONVOLU SENDI LA MONON POR „LA JUNA VIVO”:*Aŭstrio:* F. Scheibenreiter, Hermannsgasse 31/26, Wien VII.*Belgujo:* H. Rainson, Mechelen, Belga ĝironumero 335183.*Britujo:* The British Esp. Asociation, Inc. 142 High Holborn, London W.C.I.**Ĉeĥoslovakujo:** Esperanto Asocio, Praha XIX, Uralské nám. 447. Poŝtĉekkonto 12.371.*Ĉinujo:* Ĉina Esp.-Librejo, No. 14, lane 169, Carter Road, Sanhajo.*Danujo:* S.ino M. Jensen, Galtrup, Erslev, ĝironumero 44593.*Estonio:* Esperanto-Asocio de Estonio, Tallin, Poŝtkast 6.*Francujo:* M. Matthieu, Dijon, 27, Place de la République, Côte d' Or.*Hungarujo:* P. Balkanyi, Budapest, V., Nagy Sándor-u 6.*Japanujo:* Japana Esp.-Instituto, Tokio, Hongo-Motomaĉi. Poŝtĉekkonto: Tokio 11325.*Jugoslavujo:* P. Golobiĉ, Instruisto, Jesenice-Fuzine.*Latvujo:* Ludmila Jevsejeva, Riga, Reformatoru, iela 14, dz. 5.*Norvegujo:* Norvega Esp.-Ligo, p/a S.ro G. Johannessen, Skappelsgate 5, Hamar.*Polujo:* Librejo-Eldonejo, Esp. Fako, S.ro N.Szapiro, Warszawa, Nowolipki Nr. 8. Poŝtĉekkonto: Warszawa 16.562.*Svedujo:* John Karlsson, Berga, Vasterhaninge. Sveda ĝironumero 72295.*Svisujo:* R. A. Dasen, 19a Avenue Riant-Parc, Genève ĝir. 1.6256.*Usono:* Amerika Esp.-Instituto, 1111 Brooke Road, Rockford, Illinois.**Subtenu La Junularlaboron, sendu viajn librojn ĉe le redakcio de „La Juna Vivo”! (Petu senpagan libro-liston!!)**